

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 17. Marto 19 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

La paradigma projekto lanĉita

Ekde la fino de la 19-a jarcento, internaciaj kontaktoj kaj rilatoj rapide disvolviĝis. Dum postuloj de naci-ŝtatoj plifortiĝis, novaj formoj kaj praktikoj de internacia kaj transnacia kunordigo aperis tutmonde. Ili koncernis interregistarajn sed ankaŭ neregistarajn organizaĵojn kiuj reguligis la interŝanĝojn. Manpleno da imperiismaj lingvoj regis inter la elitoj, kiuj favoris la disvolviĝon de internaciaj kaj transnaciaj kontaktoj. La Unua Internacio (1864) aŭ la Internacia Komerca Ĉambro (1919) spegulas tian asocian tutmondecon, en kiu kuniĝis naciaj agantoj. Sed tiuj strukturoj celantaj modernigi kaj normigi la mondon ĉiam dependis de nacioj kiel baza unuo.

Samtempe, ĉirkaŭ la jaro 1900 aperas multnombraj movadoj, el burĝaj aŭ laboristaj medioj, kiuj alimaniere aliris organizadon kaj kunordigadon de personaj rilatoj inter popoloj de malsamaj lingvoj kaj naciecoj. Ili ne havis tujan politikan transforman celon sed proponis senperan interŝanĝon por civitanoj dividante la saman vidon pri la mondo. Tiuj movadoj ne baziĝis sur la nacio kiel baza strukturo kaj evoluigis novajn praktikojn kaj spacojn de kolektiva kaj transnacia agado. Ĉar ne malofte tiuj movadoj venis el la "marĝenoj" de la socio, ili restis plejparte preteratentitaj de historia kaj sociscienca esplorado.

Sen teritoriaj ligoj, esperantistoj rapide kreis siajn proprajn formojn de interkontakto. Ili sociumadis en flekseblaj kaj malcentralizitaj retoj kaj elpensis novajn vojaĝmanierojn. Esperantistaj vojaĝantoj serĉis spertojn for de normigitaj cirkvitoj, ŝanĝante la perspektivon de la amatora etnografo. Tiu ĉi inklino trovis sian kolektivitan esprimon ankaŭ en renkontiĝoj kaj kongresoj, kies sinsekvaj gastigaj urboj ligas la lokojn de simbola spaco. En ĉi tiu spirito, kontraŭe al la financaj interesoj de la turisma industrio, la esperantistoj establis sian pioniran sistemon de "couch surfing" jam en 1974, per la 'Pasporta Servo'.

La pariza ateliero "Esperanto-Paradigmo III" ambicias ekzameni la spertojn de neformalaj retoj, praktikoj de moviĝo kaj transnacia interŝanĝo. Ĝi pristudos

la praktikojn de la Esperanto-movado kaj ĝiajn formojn de sociumado kaj interagado sed ankaŭ invitas prelegontojn pri aliaj organizaĵoj, societoj kaj retoj.

La laborrenkontiĝo direktiĝas al magistras studentoj, postdoktoriigaj studentoj kaj estas financita de la Franca-Germana Universitato (DFH/UFA). Ĝin organizas la Centre Alexandre Koyré (EHESS), la Centre Marc Bloch (Berlino), la Universitato de Bonn kaj la Universitatoj de St. Andrews. La laborlingvoj (sen traduko) estas: germana, franca, angla kaj Esperanto. Diversaj kontribuoj estas akceptitaj en la formo de mallongaj raportoj pri redaktataj majstraj aŭ doktoraj tezoj, kontribuoj al esplorprojektoj aŭ pli longaj prezentoj. Bonvolu sendi viajn dokumentojn (maks. 200 vortoj resumon kaj maksimume 2 paĝan CV-on) al Pascal Dubourg Glatigny antaŭ la **14-a de aprilo 2023**. Demandojn direktu al pascal.dubourg@cncs.fr

Bahaa Esperanto-Ligo 50-jara

La 19-a de marto 2023 markas la 50-an datrevenon de la fondo de Bahaa Esperanto-Ligo. La starigon de BEL iniciatis grupeto de bahaanoj kolektiĝintaj ĉe la UK 1972 en Portland, Usono. Ili submetis tiucelan proponon al la Universala Domo de Justeco, la supera internacia gvidorgano de la Bahaa Kredo, kiu en marto 1973 donis sian oficialan aprobon. De tiam BEL kunordigas la kunlaboron inter la bahaa komunumo kaj la Esperanto-movado. La Ligo iom post iom kreis por si firman fundamenton, solide disvolviĝadis kaj tra la duonjarcento povis fieri pri kelkaj gravaj atingoj. Tiel BEL dekomence eldonas, nun jam de multaj jaroj regule dufoje jare, membrobultenon *La BELmonda Letero*, flegas informriĉan retejon <https://bel.bahai.de/>, regule reprezentas la Kredon ĉe UKoj kaj aliaj gravaj Esperanto-eventoj, averaĝe ĉiujare eldonas ion pri la Kredo en Esperanto kaj dum la lastaj jaroj ankaŭ subtitoligis kvar unuhorajn filmojn pri la centraj personecoj, celoj kaj disvolviĝo de la Kredo (vidu la retejon sub »literaturo, <https://bel.bahai.de/4filmoj/>), informas la bahaan komunumon pri la evoluo de Esperanto, aranĝas ĉiumonatajn virtualajn membrokunvenojn, ktp. Nuntempe en la Ligo, kiu jam de 1975 oficiale estas kunlaboranta faka asocio de UEA, membras iom pli ol 200 anoj en pli ol 50 landoj.



Okaze de sia jubileo BEL eldonas Esperanto-tradukon de *Dio preterpasas* 'God Passes By' en la originala angla), la aŭtoritata preskaŭ 500-paĝa historio de la unuaj cent jaroj de la Kredo, verkita de Shoghi Effendi, pranepo de la Fondinto de la Kredo kaj de 1921-1957 ĝia Gardanto. Krome ĝi planas informi la bahaajn instituciojn pri sia duonjarcenta disvolviĝo kaj pri la stato de la lingvo Esperanto kaj ĝia movado kaj tiucele eldonos

novan broŝuron anglalingvan kun traduko; kaj ankoraŭ pliaj aktivecoj konsideratas por la jubilea jaro.

La Bahaa Kredo, fondita de Bahá'u'lláh meze de la 19a jarcento, baziĝas sur la konvinko pri la unueco de Dio, de la religio kaj de la homaro. Ĝi havas inter siaj bazaj principoj la realigon de ĉi tiu unueco per rimedoj inkluzivantaj la adopton de universala helpa lingvo kaj i.a. ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiajorganoj pledas por tiuj principoj. Bahaanoj apartenas al preskaŭ ĉiuj etnoj kaj vivas en preskaŭ ĉiuj anguloj de la tero. Ili ĉie tra la mondo strebas krei bazdemokratiajn komunumojn malfermajn por ĉiuj; tiuj formas unikan tutmondan organizaĵon surbaze de la principo de unueco en diverseco kaj tiel modelon de unuigita, paca, prospera tutmonda socio.

Bernhard Westerhoff, sekretario

Kurso por komencantoj en Lomeo, Togolando

Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO) antaŭ iom da tempo ekfunkciigas ĉe vatsapo instruan agadon: <https://chat.whatsapp.com/FvJwQzrtR8uL3AMz5p3GdS> por internaciaj komencantoj. La uzataj lingvoj dum la instruado estas: la evea, franca kaj Esperanto. En la grupo estas 20 kursanoj nun, sed "veraj" komencantoj estas 16 homoj. Al ĉi tiuj (lokaj gekomencantoj plus unu el Benino - plejparte kun universitata eduknivelo) ni antaŭvidas 5-tagan ĉeestan kurson en ferio de aprilo 2023, por pli vive lertigi ilin pri la lingvo kaj la movado. Por doni al vi ideon pri kio temas pri, ni ĉi-sube klarigas gravajn detalojn de la projekto kaj uzas la okazon por peti vian malavaran subtenon por sukcesigi la aranĝon. Donacoj al la Afrika Fondaĵo bonvenas

KER-ekzamenoj havas jam grandan tradicion

Jam 2650 personoj el 81 landoj trapasis KER-ekzamenojn

Ni ĉiuj fieras pri ili.

La reta formo de la ekzamenoj ebligas nun al pli da samideanoj trapasi la testojn. Estas ĝojige, ke multaj deziras fari tion. Kelkaj (landaj) asocioj kaj la revuo MONATO jam en la antaŭa(j) jaro(j) diversmaniere subtenis kandidatojn en iliaj klopodoj. Dankon al ili pro tio.

Por la jaro 2023 estas promesoj de **Brita Esperanto-Asocio, Esperanto-France, Esperanto USA, Aŭstralia Esperanto-Asocio** kaj **Slovena Esperanto-Ligo** por financa subteno en formo de repago de pleno aŭ duono de la ekzamenkotizoj, pago de atestiloj kaj ties poŝtokostoj. Fondaĵo Edukado.net (el tiucele ricevitaj donacoj) povos denove subvencii ekzameniĝojn de siaj membroj, de 'geonkloj' kaj 'genevoj' de Ekparolu! kaj de aliaj kunlaborantoj.

La KER-Ekzamena Centro de UEA petas ĉiun leganton de tiu ĉi mesaĝo disvastigi la informojn pri la ĉi-jaraj ekzamenoj kaj serioze pripensi kontribuon, subtenon aŭ eĉ ekzameniĝon.

Kiam okazos sesioj?

En junio kaj aŭgusto **denove okazos retaj KER-ekzamenoj** en ĉiuj niveloj:

- la 3-an de junio je nivelo C1;
- la 10-an de junio je nivelo B2;
- la 17-an de junio je nivelo B1;
- la 4-an de aŭgusto je nivelo C2.

Dum la kongreso en Torino eblos ekzameniĝi en la tradicia maniero, papere/ĉeeste: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/uk> .

INK-ludu ankaŭ vi!

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) revenas kun la temo **La sekreta vivo de miaj najbaroj**. La tria eldono de la konkurso estis lanĉita de Akademio Literatura de

Esperanto (ALE) kunlabore kun Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj. Krom la temo **La sekreta vivo de miaj najbaroj**, du novaĵoj atendas la partoprenantojn en la ĉi jara Interkultura Novelo-Konkurso: nun eblas konkursi per **ses lingvoj** kaj estas **dek monpremioj** por gajni.

Krom Esperanto, la itala, la rusa kaj la ukraina kiuj estis akceptitaj en la dua eldono, aldoniĝas ĉi-jare la kataluna kaj la persa. Tamen tradukaĵoj el aliaj lingvoj bonvenas. Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longeco. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas menci en la sendoformularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 109-a Universala Kongreso de UEA en 2024. En la porkomencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de septembro 2023.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la dua eldono, kies temo estis *Nokta vojaĝo*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 421 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 39 landoj. La ĵurio aktuale laboras pri la juĝado de la selektitaj noveloj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 108-a UK, okazonta en Torino (29 julio-5 aŭgusto 2023). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: uea.org/kongresoj/alighilo.

Amo, tuso kaj forpaso, la novel-rikolto de la unua eldono de la konkurso estas aĉetebla en la [Libroservo de UEA](http://libroservo.de/uea) kaj ĉe [eldonejo KAVA-PECH](http://eldonejo.kava-pech.de).

===== vortoj: 1470 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@uea.org>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.